Thomas Moore,

# 'T is the Last Rose of Summer

'T is the last rose of summer left blooming alone;
All her lovely companions are faded and gone;
No flower of her kindred, no rosebud is nigh,
To reflect back her blushes, to give sigh for sigh.

I'll not leave thee, thou lone one! To pine on the stem;
Since the lovely are sleeping, go sleep thou with them.
Thus kindly I scatter thy leaves o'er the bed,
Where thy mates of the garden lie scentless and dead.

So soon may I follow when friendships decay,
And from Love's shining circle the gems drop away.
When true hearts lie wither'd and fond ones are flown,
Oh! who would inhabit this bleak world alone?

. . .

Thomas Moore,

# La lasta rozo

*tradukita de Antoni Grabowski*

Jen floras sola, forlasita la lasta rozo de l' somero,
Dum ĝia ĉarma gefrataro, velkinte kuŝas jam sur tero.
Ne estas ia flor' parenca, nek rozburĝono en proksimo,
Por interŝanĝi la ridetojn aŭ la sopirojn, laŭ kutimo.

Mi vin ne lasos, ho soleca, ĉagrene sur trunketo brili;
Ĉar la karuloj viaj dormas, do iru, dormu vi kun ili!
Foliojn viajn mi afable disĵetas sur bedeto jena:
Vi kuŝu apud senaroma, malviva kunular' ĝardena!

Mi tiel sekvu, kiam pasos de l' amikeco flor' fidela,
Kaj el brilanta amo-ringo elfalos lasta ŝton' juvela.
Ĉar kiam velkis veraj koroj, sentemaj flugis for el rondo,
Ho, kiu volus tiam loĝi solece en malvarma mondo?

. . .

Thomas Moore,

# La lasta rozo

*tradukita de Clarence Bicknell*

Jen la lasta rozeto de fora somer'!
Ĝiaj belaj kunuloj jam velkis sur ter'!
Ne restas parenco, ne unu rozflor'
Partoprenas kompate en ĝia dolor'.

Mi ne lasos vin velki tutsola, ho roz'.
Iru dormi kun ili en paca ripoz'.
Nun viajn petalojn disĵetas mi for
Al viaj kunuloj sen viv', sen odor'.

Tiel same volonte formortus mi mem,
Se ne plu min atendus amika manprem'.
Ĉar kiu kun koro en tiu ĉi mond'
Volus loĝi izola sen amorespond'?

. . .

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas* THOMAS MOORE *(∗1779-05-28 – †1852-02-25).*

*Arg-530-1053 (2014-11-04 07:57:07)*

*Mi, Manfred Retzlaff, kopiis tiun poemon el la retejo* http://www.franks.org/fr01066.htm*. Pri la verkinto, la irlanda poeto Thomas Moore, vidu la vikipedian retejon* http://en.wikipedia.org/wiki/Thomas_Moore.

*Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer" de* THOMAS MOORE *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* ANTONI GRABOWSKI *(∗1857-06-11 – †1921-07-04).*

*Arg-530-1056 (2010-03-28 19:37:25)*

*Tiun ĉi poem-tradukon mi, Manfred Retzlaff, kopiis el la retejo* http://www.netlibrary.net/eBooks/Wordtheque/eo/221211.TXT.

*Traduko de la Angla poemo "'T is the Last Rose of Summer" de* THOMAS MOORE *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* CLARENCE BICKNELL *(∗1842-10-27 – †1918-07-17).*

*Arg-530-1054 (2014-02-15 13:55:46)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi poem-tradukon en folio kun kantoj prezentitaj dum la 12a jarkunveno de Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), la 12-an de oktobro 1968. Pri la tradukinto vidu la retejon* http://eo.wikisource.org/wiki/AEњtoro:Bicknell_C.,_Bordigheza.